# SUDFRANCA STELO

Bulteno de la Esperanto-Federacio « Languedoc-Roussillon »

*5, Quai Vauban* - 66-**PERPIGNAN** (P.-O.) - *Telefono 34-38-84*

Jara Abono : 3 F. – C. C. P. 956-28 Montpellier

N° 37 ---------------- ooo ---------------- 1a Kvaronjaro 1971 ----------

## NARBONA KUNVENO (6an de decembro 1970)

La estraro de la Federacio Langvedok-Rusijono kaj aliaj membroj kunvenis la sesan de decembro, en la Junuldomo de Narbono.
Dek-kvin membroj ĉeestis.

Kiel kutime, la etoso estis agrabla kaj ĝoja tagmanĝo kunvenigis ĉiujn partoprenantojn. Denove post la manĝo, nia grupo kunvenis kaj la laboro daŭris preskaŭ ĝis la dekkvina horo.

Multaj aferoj estis diskutitaj : propagandaj, administraj,ktp., kaj ankaŭ organizado de la venonta federacia kongreso en Nimes.
Sed la ĉefa afero por la kasisto estas :kotizoj...
Li konstatas, ke por la jaro 1970 ĉirkaŭ kvindek kotizoj estas ne ankoraŭ pagitaj. Li preĝpetas ĉiujn, kiuj ankoraŭ ne pagis sian kotizon, ke ili faru tion la plej eble rapide.
Li memorigas ke du kazoj povas okazi :

1°) Pago per poŝtkonto
2°) Pago per banka konto.

En la unua kazo, [illegible] esti je la ordo de : FEDERATION d'ESPERANTO LANGUEDOC-ROUSSILLON.
En la dua okazo, atendante ke ni malfermu bankan konton en Narbono, je la nomo de S-ro DEL[illegible]
La kasisto atendas viajn kotisojn kiel Mesion !

Partoprenas la ĝeneralan diskuton : S-inoj AUTHIER, BENTZ, ROUVEURE, Fr-ino TERRAL [illegible] BELIERS, F-inoj BONNY kaj VIERNE el Montpellier; S-ro CONSTANT, Ge-roj DELIGNE kaj LOUBIC el NARBONNE; S-ro ABOULKER kaj Ge-roj VOLPELIERE el Nimes; S-ro LLECH-WLEEM kaj Fr-ino VERRY el Perpignan.

Dum la renkonto oni ĉefe parolis pri 1
- la 10-a Paska Kultura Semajno kiu okazos de la 3a ĝis la 9a de aprilo, en Grésillon.

- la lernolibro ĵus verkita de S-ino Volpelière laŭ rekta metodo.

- la plej bona maniero propagandi :

  - flue parolante la lingvon,
  - aliĝante al la Mondcivitanoj kaj al la Popoluniversitatoj,
  petante informojn en esperanto ĉe la turismaj Oficejoj,
  - verkante taŭgajn artikolojn por la gazetaro,

- indikante, sur la telefona jarlibro, la vorton "Esperanto" antaŭ sia numero,
- aranĝante kun librovendistoj ekspozicion pri esperanto-libroj en bona videbla loko de la magazeno,
- pere de flagetoj, glumarkoj aŭ sloganoj sur la aŭtomobiloj, ktp...

---

NOVA INSTRUMETODO por ESPERANTO.

Dank'al la libreto fare de S-ino Volplière "Parler l'Esperanto", la laboro de la instruanto estas faciligita. Li estas nur necesa por la prononco kaj por kelkaj klarigoj kaj ne bezonas ricevi la lernantojn ĉiusemajne. Sed bedaùrinde la lernantoj devas ja cerbumi.

Tiu libreto (dua eldono) estas 56 paĝa ofseta broŝuro (formato 13/21). Dividita en du kolumnoj, la tuta teksto estas dulingva : al ĉiu esperanta frazo respondas ĝia franca traduko. La lernanto laùtlegu la esperantan tekston, poste li kaŝu kaj retrovu ĝin, tradukante la francan parton. Ĝi ankaù skribu unu frazon el ĉiu leciono, unue kopiante, poste nur cerbumante. La frazoj sonas "lernolibre" en la unuaj lecionoj, sed rapide la lernanto trovas seninterrompajn tekstojn, proverbojn, dialogojn, anekdotojn, kiuj espereble estas sufiĉe allogaj por ke ĝi persisteme laboru.

La lecionoj estas surbendigitaj. Kiu posedas magnetofonon povas do lerni sen profesoro, dum la momentoj de li elektitaj, sed tiuokaze, li bezonas leksikonon kaj gramatikon, ĉar nur la plej gravaj reguloj kaj la prefiksoj kaj sufiksoj estas rapide klarigitaj.

La vortprovizo atingas 650 elementojn, proksimume 10 en ĉiu el la 79 mallongaj lecionoj. Ĉiu nova vorto estas substrekita. Per tiu metodo, oni lernas NE VORTOJN SED FRAZOJN, kaj oni tuj PAROLAS ESPERANTON.

(Prezo 9 F (afrankite). Kvinope, po 7,50. Havebla ĉe S-ino Volpelière 10, Rue de la Servie 30 - Nimes (pĉk : 1070-06 Montpellier.

---

Diversaj porpropagandaj agadoj.

Tri librovendistoj el Nimes konsentis ekspozicii kelkajn es-tajn librojn en montrofenestro kelkajn tagojn antaù la Kongreso de la 28a de Marto.

Dank'al la subvencio por la federacio de Gard, la alesa grupo estas fabrikanta kofrojn por ekspozicio laù la modelo de tiu de S-ro Lentaigne. Tri kofrojn estas jam finitaj.

---

Bonvolu sendi INFORMOJN por SUD-FRANCA STELO antaù la 30a de aprilo al S-ro FRUS - 2 H - N° 996 - ZUP - NIMES - 30.

---

Adreso de la kasisto : S-ro DELIGNE : 3 (C) Rue Paul Ramadier 11 - NARBONNE.

KONGRESO de la DEPARTEMENTA FEDERACIO GARD

La departementa kongreso de la Federacio Gard okazis en la salono de la NIMES-A JUNULARA DOMO la 17 an de januaro 1971, prezidita de Sro René RAYNAUD (ALES), ĉirkaŭgita de G-oj VOLPELIERE,S-ino FRUS,S-oj ABOULKER,GERLIER, JANNEZ,LAVAL,PELLETIER,PUECHAGUT,LAVAL,RICARDO,VIGNE,k.t.p.

La komuna propaganda materialo estis ekspoziciita, kies kestoj aranĝitaj por montri la esperantistajn librojn.-

Estis anstataŭgita la triono de la konsilantaro.-Ni atentigas la regionajn samideanojn pri la utileco de tiu speciala organizo,kiu ebligas la donacon de ĉiujara subvencio el la Ĝenerala Konsilantaro, kaj la starigon de interpropagandilaro.-

S-ino VOLPELIERE parolis pri la metodo kiun ŝi verkis "Parlez l'Esperanto", pri kiu oni povas legi pli detale en tiu bulteno .-

Komuna ekskurso estas antaŭvidàta en BAGNOLS sur CEZE, la 16an de Majo.-De nun,estontaj sciigoj precizonta la kunvenejon .-

La jara kotizo estas pagebla al nia kasistino, ĉu 5 F-oj, per p.ĉ.k. Federation Departementale du Gard pour l'Esperanto,185-707 Montpellier ....Tre dankon...

H.J.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

VIVO de la Urbaj grupoj....Ĉiugrupa Kroniko.....

A L E S : La vivo de nia grupo fluas sen menciinda okazaĵo.- Ni registris nur unu novan adepton, kaj la du kiuj venis al ni pasintan jaron,kontentige progresis kaj plie aktive agadas ĉiu en sia medio.-Bedaŭrinde,niaj klopodoj por gvidi kurson en la liceo fiaskis.- Ni kunvenas ĉiumarde por konversacii -esperante,kompreheble -

R.R.

N A R B O N N E : EPIFANIO kaj ESPERANTO ...

Merkredo vespere,6an de januaro, la Narbona Grupo ĝoje festis Epifanion.

Tio estis bona okazo por konigi al la membroj de la grupo la ĉi-jarajn gelernantojn.

La kunveno okazis ĉe la Junuldomo.Tiu-ĉi,kies gastamo estas bone konita,pruntis al ni grandan salonon,bele taŭgaranĝita kaj dekoraciita de la afabla gastantino.

Dudek kvar personoj ĉeestis la kunvenon kaj tiel atestis pri la vivopleneco de la grupo.

Oni malplenigis kelkajn botelojn da "Blanquette" kaj manĝis kelkajn platkukojn bone kuirigitajn.

Hazardo elektis du Reĝojn kaj du Reĝinojn prave honorigitaj de de cirkonstancaj kanzonoj,kompreneble tradukitaj en Esperanto.

Gereĝoj afable regis siajn regatojn ĝis malfrue en la vespero en la plej eŭforia etoso.

Kelkaj projektoj por venontaj kunvenoj,kulturaj sed amuzaj estis diskutitaj kaj alĝustigitaj.

Kun plezuro,oni konstatis la progresojn de la novaj gelernantoj en la universala lingvo;sed,bedaŭrinde, la plej bonaj aferoj havas finon, kaj oni disiĝis malfrue kun promeso kunveni denove baldaŭ.-

DEL.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

NIA GRUPO.

La grupo regule kunvenas ĉiumonate, dum la vintra sezono en la domo de ge-roj Volpelière, ĉar en nia sidejo : la urba biblioteko, ne estas sufiĉe varme.

12 ĝis 15 anoj ĉeestas la kunvenojn. Du aŭ tri nur aŭskultas la babilemulojn kaj aliaj provas paroli kelkajn frazojn.

Krom la administraj aferoj kaj paroloj pri novaĵoj en nia Es-ta mondo, ni dediĉas proks. 20 minutojn al ludeto per frazoj, kiujn la ĉeestantoj devas imagi.

Dum oktobro ge-roj Volpelière ricevis tute ne atenditan viziton de hungaroj : gd-roj Lesznaï. Telefone avertit., kelkaj samideanoj povis kuniĝi vespere por aŭskulti Sron Lesznaï, tre lerta esperantisto. S-ro Gerlier veturigis ilin al Ponto de Gardo kaj ge-roj Volpelière vizitigis ilin Nimes, Aigues-Mortes, Grau du Roi, Grande Motte. Komprenoble niaj hungaraj samideanoj estis ĉarmitaj de tiu dutaga plenplenigita restado.

Post kelkaj semajnoj oni povas vidi en la Departementa Biblioteko kelkajn librojn eksponiciitajn, kiujn la vin tantoj povas trankvile rigardi

-o-o-o-o-o-

Kongreso de la FEDERACIO LANGVEDOKO-RUSIJONO.

Ĝi okazos en Nimes la dimanĉon 28an de Marto je la 9a h ½ en la "Centre des Sports et Loisirs", Place Hubert Rouger, Bd Jean-Jaurès, ĉe la eniro de la urbo, se oni venas de Montpellier.

Tagordo :

9h30 - 1) Administraj aferoj :
Morala Raporto - S-ro Llech-Walter
Financa Raporto - S-ro Deligne
Deziresprimoj prezentotaj dum la Nacia Kongreso en Liono
Raportoj de ĉiuj grupdelegitoj (1)
Diversaj demandoj.

11h - 2) Festparolado : Prelego de S-ro A.Albault.

3) Komuna manĝo ne multekosta en "Kolegio Camargue" (2)

14h½ - 4) Filmo pri Egiptujo kun komentario esperantlingva. Filmo kaj komentario de Fr-ino Terral.

(1) La grupoj de Alès, Montpellier, Béziers, Narbonne bonvolu sciigi la nomon de la raportonto al S-ino Volpelière.
(2) Pri via partopreno je la komuna manĝo, bonvolu averti S-inon Volpelière ANTAU la 14a de MARTO. Bonvolu !...

---

POR la PROPAGANDO. Okaze nian venontan kongreson, vi trovos en tiu-ĉi bultenomemgluotan anonceton por meti sur fenestro de via aŭtomobilo.

Ni petegas : NE FORGESU !...

Vi ankaŭ trovos Kalendareton donacitan de presejo, kiuj montras uzon de esperanto en komerca tereno.

---

## PROVIZORA PROGRAMO de la 10a PASKA KULTURA SEMAJNO.

La 10-a Paska Kultura Semajno okazos de la sabato 3-a de Aprilo vespere ĝis la vendredo 9-a de aprilo vespere, en la kastelo Grésillon, apud Baugé (Maine-et-Loire)

Por danki profesorojn JANTON kaj DUC-GONINAZ, kiuj malfermis esperanto-kursojn ĉe la fakultatoj de Clermont-Ferrand kaj de Aix-en-Provence, U.F.E. gastigos senpage kelkajn studentojn el tiuj beletraj fakultatoj.

La Federacioj rajtas proponi unu studenton por senpaga restado. Estas konsilinde al grupoj kaj federacioj sendi aliajn lernantojn je la favora prezo, por la tuta restado de 85 F. (1)

Partoprenos ankaŭ liceanoj, kolegianoj, seminarianoj el Francujo, Germanujo, Italujo, Britujo, k.t.p.

La plenkreskuloj povas partopreni la Paskan Kulturan Semajnon pagante po tage, 24 F (aparta ĉambro); 21 F (familia ĉambro); 20 F (box-ĉambro); la kampadistoj pagas 10 F; infanoj ĝis 2jaroj pagas 6 F; inter du kaj dek jaroj 12 F; poste 17 F.

Krome, la plenkreskuloj devas pagi aliĝkotizon de 25 F.

La definitivan programon oni sendos al ĉiuj partoprenantoj, almenaŭ unu monaton antaŭ la staĝo, sed de nun ni povas indiki la jenon :

- Matene : kursoj;
- Posttagmeze : ludoj kaj promenadoj,
- Vespere : prelegoj, amikaj kaj distraj aranĝoj.

Ge-roj TURIN gvidos la kursojn por la seminarianoj, liceanoj, kolegianoj, kaj plenkreskuloj.

S-ro RIBOT zorgos pri la studentoj de la beletraj fakultatoj.

Pr-ro Pierre BABIN, Direktoro de la Kulturdomo, S-roj Jean THIERRY, Jack-André ROUSSEAU kaj aliaj eminentaj samideanoj : S-roj ALBAULT, BOURDEAUX, JANTON, LLECH-WALTER, ktp. prelegos pri diversaj temoj.

Merkredon, 7an de Aprilo, posttagmeze okazos sub la gvidado de S-ino CHEVERRY vizito de la fortika mezepoka kastelo de Angers kaj de la famkonata tapetaro "Apokalipso".

Vendredon vespere, la partoprenantoj de la Kultura Semajno povos uzi, en Saumur, la rektan noktan vagonaron por iri al Lyon por la U.F.E. kongreso. Kompreneble la stipendiuloj, staĝanoj, plenkreskuloj,kiuj dezirus ankraŭ resti en Gresillon povus fari tion je iliaj propraj kostoj.

Oni povas peti de la Kulturdomo rabatilon por la fervojo.

Petu informojn al S-ro René LLECH-WALTER, 5, Quai Vauban - 66 - Perpignan aŭ al S-ro Pierre BABIN, 13, Bd de la Chauvinière - 44 - Nantes.

(1)Speciala fonduso estas kreita. Oni povas sendi la donacojn ĉu al U.F.E, Union Francaise pour l'Esperanto), 34, R. de Chabrol. Paris. Pĉk : 855-35, Paris; ĉu al S-ro Pierre Babin (Direkt. de la Kulturdomo de Grésillon, 13, Bd de la Chauvinière, Nantes, Pĉk : 2813-61, Nantes.

Ne forgesu aldoni ĉe la koresponda kupono :
"Fonduso : 10-a Paska Kultura Semajno". Dankon !

-o-o-o-o-o-o o-o-

En la kadro de la Nacia Kongreso JUNULARA RENKONTIĜO PASKON 1971.

JEFO organizas junularan renkontiĝon de la 5a de aprilo vespere ĝis la 12a /4 matene ĉe "Centre International de séjour de la Junular-domo des Etats-Unis", 46, Rue du Commandant Pégoud, Lyon (8ème).

Ni invitas ĉiujn gejunulujn el Francujo kaj el la mondo ĝin partopreni.

Jenaj programeroj antaŭviditaj :

- Prelego kaj diskuto pri la strukturo de la Esperanto-Movado
- Kiel fondi junularan grupon ?
- Kiel pridiskuti la grupdinamikon ?
- Vizito ĉe BELLET-firmao kaj silkfabriko
- Duontago pri Eŭropo
- Studenta tago
- Prelego pri "Originala Esperanto Literaturo"
- Vizito tra malnova Lyon kaj muzeo de la pupoj.
- Malfermo de la Nacia Kongreso
- Ĝeneralaj kunvenoj de UFE
- Varieteca vespero
- Debato kies titolo antaŭvidita : La Esperantisto vid'al vide la movado.
- Oratora konkurso. Titoloj antaŭviditaj : Problemo de la kooperado, interrilato kooperado kaj kolonialismo - Problemo de la mortpuno - Problemo de eŭtanazio.
- ĝenerala kunveno de JEFO
- Internaciaj vesperoj, k.t.p.

Aliĝo, tranokto, manĝoj sen trinkaĵoj por malmultekosta prezo je : 150.-Fr.

Ĉiuj partoprenantoj de la semajno, kiuj sendos la aliĝilon kun la antaŭpago je 20 F aŭ la tuta pago de la restado, ricevos rabatbileton sur franca fervojo.
Ciuj pagoj al "Organisation de la Jeunesse Esperantiste Française" :
C.C.P. N° 31 709 94 - La Source.

Favora prezo estas farota por la gejunuloj, kiuj nur partoprenas kelkajn tagojn. Petu specialajn informojn indikante la intencan restadon.

Al ĉiuj kongresanoj de UFE eblas tranokti por malmultekosta prezo je 7 Fr. po nokto ĉe la junulardomo des Etats-Unis en Lyon.

Por ĉiuj detalaj informoj, skribu al :

JEFO - Sekretario S-ro Jo. CATIL, Quartier Coquillard - 26 - ROMANS - Francujo, antaŭ la 1/4/1971

aŭ al S-ro Gilbert MILLAT, 507, Avenue du 8 Mai - 69 - CALUIRE

Ni esperas multnombrajn geĉeestantojn por celi niajn vidpunktojn kaj vigle agi, tiel ke ni fortigu la kunlaboron, amikecon kaj interŝanĝon.

La sekretario.